N-ro 1

S-EVILA FANZINO

# Ĉiesrevuino

VERKITA EN LA PLEJ BONGUSTA LANGVO. JES, LANGVO!

MI' VENDAS NIGRULINON

POEZIAĴOJ

grava fikonkurso

KOMIKSOJ

frenezaĴO



Félix Labisse.

# LA DAŬRIGO DE LA APERTO

ĈIES-REVUINO
eldonas S.E.J.O.
№1 1-1-1985
Ĉefkunordiganto:
Francisco Pérez Cruces
Kunlaboras:
Luis Gilpérez Fraile
Alberto Franco
Antonio Rodríguez

Desegnoj de:
Pablo Parrilla



# Prezentado

LEGENDHISTORIO

Tio... Saluton! Aperas beba revuo: Ĉies revuino! Ni komunikas vin, ke la kapo de nia membro, kiu elpensis tiun titolon ankoraŭ fumas. Por eviti tion al vi, ni klarigas la nomon. Ĉar nia revuo "fanzino" havas inospiriton sekse kaj mense (ni ŝanĝiĝadas iomete tro multe), tiel nomitas ĝi (aŭ ŝi). Ankaŭ ina ĉar ni spertas, ke nia lingvo estas bongusta kiel lango. "Esperanto estas bongusta langvo". Nia revuo estas ankaŭ ĉiesa; Kial? Ĉar ja. Krome de tiu kialo, ĉar ni oferiĝas vin kiel stratangulino... pro arĝento.

Ĝis !, se la raketo ne falas, se jes, ADIAŬ!

P.S. Kiam ni malovras tiun ĉefartikoleton iuj SEJO-membroj proponis ne permesi preni la nonom de tiel nobla kaj prestiĝa institucio (SEJO, kaj bonvolu ne ridi!)"al tiuj porkuloj" (t.e. ni)

la ĉefo

# INFORMAĴOJ ajnaj

Kiel vi jam scias, la Kongreso lasis al Sevilo profiton de preskaŭ... kaj al la Federacio de 100.000 ptoj. Suriĉe bone, ĉu ne? Tamen ankoraŭ ne aperis en la "Boletin' de la Federasjon' espanjola de Esperanto" la bilanco, kiun tiel pasie atendas la federacianoj.

Alie, komenciĝis en la Gimnazio Velázquez kursoj de esperanto je baza kaj meza nivelo. Nuntempe ĉeestas ilin preskaŭ dekkvino da personoj ambaŭseksaj, aŭ gea, oĉjoj!

S.E.J.O. aranĝis la tiel nomatajn "Parolrondoj"-n, en kiuj oni realigis jenajn konferencojn sekvitajn de interesaj debatoj: Parolis Francisco Pérez Cruces pri "Historiaj Seviljaj anekdotoj", Alberto Franco Ramírez pri "Kamito-semida lingvaro", Antonio Rodríguez G. pri "Iom pri la vetero science" kaj Luizo Gilpérez pri "Aventuro tra riveroj kavernaj". Estas anoncitaj kelkaj aliaj prelegoj, inter kiuj elstaras tiu Eduardo González pri "Marista vivo". Tiuj aktivaĵoj estas tre interesaj kaj por la plibonigo de nia lingva nivelo kaj por la ekkono de novaj temoj de ĝenerala intereso.

La eldonado de ĉi revuo kaŭzis problemojn ene de la sino de SEJO. Kiam oni tajpas ĉi artikolon, oni ne scias ĉu oni publikigos ĝin. Iu el la inaj membroj ĝeniĝis pro la publikigo de desegnaĵo (laŭ ŝi) referanta ŝin. Onjoj, onjoj !

Ĉar ni forgesis skribi la indekson, ĉi tie ni publikigos kvazaŭindekson : Ĉeestos amuzaĵoj, artikoloj de junaj kunlaborantoj, komiksoj, receptoj, freneza paĝo (se oni povas nomi tion paĝo), ktp.

ĜUU LA REVUON !!!

## MI VENDAS NIGRULINON

Legante mi libron de Joaquín Romero Murube, trovis en ĝi la belan anekdoton kiun vi legos: " Mi vendas unun mian sklavulinon, nigrecan, nomatan Marían, plimalpli dudekjaran, tiun kiun mi vendas pro mia sklavulino es ti, kaptita dum bona milito kaj ne pace, kaj pro graveda kiel ŝi estas, kaj mi certigas vin ke ne estas drinkeĝema, ŝtelema, forkurema, malbonfarta nek ende monigita; nek havas malbonfartan koron, nek klarajn okulojn nevidantajn; nek edziiĝintas, nek faris iun ajn delikton pro kiu ŝi meritas mortpunon; nek havas alian malbonaĵon, nek difektojn, nek publikan kulpon, nek sekretan... Mi ŝin vendas je prezo de centdekokaj dukadoj per realoj je dekunu argentrealoj po dukado".

Subskribita de Antonio de Iguera, loĝanto de Triana kaj komerciisto de geskavuloj, 1776.

(El J.R. Murube, La Ĉielo kiun ni perdis, 1964)

Fco. Cruces.

P A C O

VIVU VOLAPÜK!

Ĉi-nokte amuziĝos mi tre, sed kun vi NE!

NOTU: N.A.T.O NEN. ©SEJO

NOTU: N.A.T.O

NOTU: N.A.T.O

HISPANA TIPA MANĜAĴO: "PAELLA"

Varado:

1º) En fritilego oni varmigas 12 ole-supkulerojn.

2º) Kiam ĝi estas sufiĉe varma oni enmetas 1 grandan kapsikon, 3 ajlerojn kaj 1 cepon.

3º) Post bruniĝo, metu duonkilon da malgrasa porkaĵo kaj 2 kok-femurojn

4º) Brunigite, aldonu kvaronkilon da kalmaro, 1/2 k. da mitulo, 1/4 k. da parapenako senhaŭtigita, 100 g. da pizo. Dismovigu ĉion.

5º) Enmetu 400 g. da rizo, enverŝu 1,1/4 litron da akvo, 2 tekulerojn da salo, iomete da muelita pipro kaj safrano kaj petroselo.

6º) Post kvin-minuta forta bolado necesas malvarmigado kvaronhora. Aldonu citronerojn. Nur surtabligu kaj jen do via bongusta plado.

7º) Bonan apetiton.

A.R.G.



LA DU ANASETOJ
ESTAS LA VICO DE L' PAŬLO!
MISTIKISMO
DE KIAM MI UNUIĜIS AL SANKTA JOHANO DE LA KRUCO, MI POSTE NENIAM REMALSUPRENIRIS KAJ ĈAR ONI FORPORTIS DE ĈITIE LA FUTBALMAŜINON KAJ ĈITIE ESTAS TEDEGE...
KAJ LA ALTEGA DIO EKIS LA VOJON POR KUNIĜO.
TARARIiiii!
PLOF!
KAJ DIO APERIĜIS ANTAŬ LA VIKTIMO, PARDONU, LA ELEKTITO.
Se vi volas mian horloĝon sciu, ke oni jus ŝtelis ĝin de mi!!!
Ho, ne timu! Mi estas via Dio, estanta en la ĉieloj!
Fik! se miaj kolegoj sciiĝas tion ĉi, ve al mi!
Mi venis kuniĝi al vi kaj sperti aman historion kun via pekaĵplena animo
Nun mi iometelacas, vi komprenas, la vojaĝo... kial ni ne biertrink

©Pablo84

NIA ADRESO KAJ NI PREMIOS KAJ PUBLIKIGOS LA TRI PLI BONAJN.



ĈIES REVUINO

Eŭropanoj, abonu!

KIEL VI POVAS ABONI ĈIES-REVUINOn?

-JARA ABONO KOSTAS 200 ptojn ( 4 Internaciajn respondkuponojn). PER TIU ABONO VI RICEVOS 4 NUMEROJN.

-SENDOKOSTON ONI APARTE PAGOS.

-SENDU VIAN NOMOJN KAJ ADRESON, KAJ LA MONON AL NIA ADRESO.

ABONU!

200 ptoj=jara abono.

Lasmenx

Passa

MEVÓYOUS

... es pobre de deseos

Safo

Cicerón

venir chez moi

pour joiz mon

chameau







PACO

LIBERO

Alles rachten rezervitEn

Riveroj starigi kaj

8/2747

velar por

Versaĵoj de A. Caeiro de F. Pessoa

Yo núnca guardé rebáños
Y és cómo si lós guardáse
Mi álma es igual q. un pastór
Conóce el viénto y el sól
Y ánda de la máno de lás estaciónes
Continuando y viendo

gardis ŝafarojn
Kaj estas kvazaŭ mi ilin gardas
Kaj gardas mi ilin
Kvazaŭ ... ŝajne mi gardas
Mia spirito pastistas ...

Kaj estas kvazaŭ mi ilin gardas

Mi stelis ĉi tion de la redaktoro kaj publikigis.

OTAN AÚ




SENDU VIAJN KOMIKSOJN POR PUBLIKIGO AL NIA REVUO.

POEZIA PAĜO.

## KVAR ROZOJ

'Stas kvar roz'je via honor'
en kiun mi donas vin la glas'.
Du pro via ĝem',
du pro la ridet'.
Estas por vi kvar rozoj ja.
Prenu mian glason, trinku el ĝi
kvar rozojn kiujn donas vin.
koloras ĝi
kiel via tolaĵar'
kaj roze odoras kiel vi.
'Stas kvar roz'je via honor,
en la botelo kvar pli.
Trinku mia am',
tiu ŝtas via flor'.
Prenu miajn kvar rozojn,
trinku miajn kvar rozojn
kaj, forgesu alion kiun donis vin.

(El Gabinete Caligari)



Ŝtorm', bat', frap'
malpacas interne;
Spitas kaj batalas,
maltrankvilas kaj amaras
splen'.
Mi denove amas.

(Alberto Franco)



Mi malamas la teron kaj la ĉielon,
la sunon, la lunon, la stelojn, l'akvon,
kaj la lumon, la helecon, la brilon,
la maron kaj l'okulon de diant',
ankaŭ la ploron, la ridon, la kanton,
la silenton kaj la voĉon de blek',
la parolon, la spiron kaj la animon,
la dion kaj la diablon,
la tuton kaj ankaŭ min.
Mi malamas ĉion
krom vin.

( El John Forsyth)

KIU ESTAS LA VERA H.E.F.INO?
Sekvu la indikilojn!




* Hispana Esperanta Fraŭlino.


ANONCOJ EN ĈIES-REVUINO

KOMPLETA PAĜO: 800 P.
DUONO : 400 P.
KVARONO 200 P.
OKONO 100 P.

Ĉi tiuj prezoj validas por anoncoj en sola numero de la Revuo. La anoncoj povas esti esperantlingve aŭ en kiu ajn lingvo el la Iberia duoninsulo. Se vi volas ricevi la revuon en kiu aperas via anonco, b.v. aldoni al la supraj ciferoj la kvanton je 55 ptoj. Sendu poŝtmandate la monon al:

KULTURA KAJ SPORTA CENTRO DE SEJO.
str. Pozo, 3
SEVILLA- 41003

Sendu la anoncojn jam pretaj

ELREDAKCIAN DANKON AL:

Instituto DEX s.a.
JAIME BALME, 8
Apartado 7.009
SEVILLA - 7
Teléf. 25 56 38

**Empresa Consultora del Ministerio de Agricultura**

Laboratorio de Productos Farmacéuticos para veterinaria
Eutanásicos
Raticidas
Asesoramiento técnico para desratizaciones, desinfecciones y desinsectaciones

Rg. M. Sevilla L. 72 Secc. 3ª. F. 146-T. 213-H, 5822 Insc, 1ª. N.º I.F. A 41026725




Se vi vidas, konstatas, rimarkas, perceptas, kontrolas, trovas, elrigardas, divenas, certigas, vizias eraron, eĉ la plej etan kaŭ malgrandan, bonvolu averti, komuniki, skribi, letersendi, adresi, telefondiri aŭ sciigi al ni viajn korektojn, precizigojn, ĝustigojn, ŝanĝojn, aranĝojn, plibonigojn, aldonaĵojn, kotopoaĵojn; Ĉu al ni mankas vortprovizo, ĉu?

# ĈIESREVUINO

Eldonejo : str. Pozo, 3 SEVILLA-41003 HISPANIO.